# ELNA NEWSLETTER

## NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Published by the Esperanto League for North America. May-June 1974.
Editor: Charles R. L. Power. Editorial Committee: Robert Bailey, Margaret Hagler, Dorothy Holland, Jonathan Pool. Includes section in Esperanto, Bulteno, sent to ELNA members only.

## SFSU Courses Still Open

The most prestigious series of Esperanto courses available in this country will be presented for the fifth consecutive year at San Francisco State University, summer session. World-famous Esperanto poet, editor, essayist, columnist, reviewer and pedagogue William Auld will come from his native Scotland, where he is Depute Rector of Lornshill Academy, to guide the SFSU Esperanto Workshop.

He will personally instruct two of the courses, with the possibility of a third. The basic course, for those with no previous knowledge of Esperanto, will use Mr. Auld's own textbooks A First Course and A New Approach, and Marjorie Boulton's collection of short dramas Virino ĉe la landlimo for reading material. The advanced course will study the Kalocsay translation of King Lear and the Zamenhof centenary volume Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro. If demand suffices, Mr. Auld has consented to teach a third course for English-speaking Esperantists interested in translation.

Duncan Charters, an expert in foreign language instruction methods, will assist Mr. Auld by teaching two of the courses. One will be a new feature for the Workshop: a special course for Esperanto teachers. Texts to be studied include Rudolf Rakuŝa's Metodiko de la Esperanto-Instruado and Charters's own Konsiloj por la instruisto de Esperanto. Charters will also instruct the intermediate course, which will study Auld's graded reader Paŝoj al plena posedo, Edmond Privat's famous Vivo de Zamenhof, and La kremo de Kalocsay, a collection of the most important poems of Kálmán Kalocsay, the pivotal figure in the group of Esperanto writers known as the Budapest school.

The cost of the complete three-week workshop (15 July—2 August) will be $93.00. With the consent of the instructor, it may be possible to participate in more than one of the courses without additional payment. Room and board will be available at $48.50 weekly. An option to study abroad is available to those who wish to spend the third week at the World Esperanto Congress in Hamburg.

For application forms, write immediately to ELNA, P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010.



Dr. Richard L. Trapp (left), Associate Dean of the School of Humanities, San Francisco State College, discusses possible accreditation criteria for Esperanto teachers in California with Duncan Charters. (Photo: Minerva Rees.)

## World Stops for Day

On Tuesday, 23 April 1974, the world ground to a halt.

An overstatement, certainly. Actually, the language problem merely led to the cancellation of a few meetings at a certain international body, a phenomenon by no means unique. What made the event noteworthy was the identity of the organization involved: the United Nations.

The occasion was a sick-in by the overworked English, French and Spanish interpretive staff. In forcing the cancellation of eleven UN meetings—two of them sessions of the General Assembly—these thirty-six men and women effectively demonstrated themselves to be among the most practically powerful human beings on the globe.

$300,000 had been budgeted for one of the General Assembly sessions, scheduled to deal with raw materials and development. Six heads of state and forty-five ministers had turned up for the meeting.

The only practical suggestion was made by a Jordanian diplomat: cut down on talk. "Anything worth saying can be completed in ten minutes."

It should be noted in this connection that Arabic was recently accepted as an official and working language of the UN, on the condition that the Arab member states pay all related expenses for the first three years. Linguistic equality—to those who can afford it!

How long will the world's greatest tax-supported institution be allowed to ignore the obvious solution to the language barrier, Esperanto, the international language?

## ELNA President Visits Central Office

(E. James Lieberman, M. D., President of ELNA, paid a visit to the Central Office on 10 May. His report to the membership follows.)

It was a great pleasure and inspiration to visit the new ELNA office in San Mateo. The two rooms are spacious and attractive, the location convenient for staff and visitors, the cost reasonable. Director Charles Power has been chiefly occupied—effectively, it is evident—with ELNA publications and setting up the office. Cathy and Bill Schulze and Robert Bailey serve as ELNA's Advisory Committee. ELNA Treasurer Peggy Linker reports over $5,000 received in contributions for the Central Office—a heartening demonstration of support, within a short time. The book service will be moved to the Central Office and it may be possible to have small classes and to recruit volunteers from the local community.

Let me take this opportunity to urge ELNA members to attend the Annual Congress in Spokane, June 21-23. We will discuss the furtherance of Esperanto in North America through membership development and information to the general public.

## New Audio Course Available

A unique self-paced instruction program on Esperanto is now available on audio cassettes.

Author of "How to Understand and Speak Esperanto" is Paul Fox, linguist and expert Esperantist, and experienced teacher of language at the high school and college level. In addition to presenting an introduction to written and spoken Esperanto, Mr. Fox describes how to identify and communicate with Esperantists in other countries, and how they can help foreign travellers who speak Esperanto. Mr. Fox also explains how serious Esperantists can take advantage of the services offered by various Esperanto organizations, at home and abroad. Here is a fast-paced program that teaches how Esperanto is constructed and used as a living language.

The twelve-lesson program includes six cassettes, a programmed workbook, an Esperanto-English dictionary, and a handsome vinyl album. Price for all materials is $70.00, from the publisher, Teach 'em, Inc.

For more information about this new program, write to Teach 'em, Inc., 625 N. Michigan Avenue, Chicago, IL 60611.


## Last-Minute Call to Hamburg

The World Esperanto Association (UEA) has sent word that almost everything about the coming World Congress in Hamburg (27 June—3 August 1974) is shaping up to form one of the finest Esperanto events in decades. Although Esperantists should be more reluctant than most to accept national stereotypes, the Local Congress Committee is apparently doing its best to live up to the German reputation for organizational talent. The site of the event, Hamburg's Congress Center, the largest hall of which can accommodate 3000 persons, is one of the biggest, most modern, best equipped meeting places of the entire world. The program is even more attractive than that of most World Congresses, for the 59th will quite possibly be a turning point in the organization of the Esperanto movement. Among other items, the election of the President of UEA will take place.

Yes, almost everything is proceeding smoothly—everything but you! The number of persons who have signed up for the event is, although already well over the number at last year's Congress in Belgrade, not entirely satisfying to UEA. So let's get a move on! Sign-ups will be accepted until 20 June 1974. The Congress fee should be sent without delay to the Central Office of UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Netherlands. The following fees are in Deutschmarks; consult your newspaper for the current exchange rate.

| | |
|---|---|
| 1. Non-individual member of UEA | 117.60 |
| 2. Member with yearbook (MJ) | 102.60 |
| 3. Member-subscriber (MA) | 87.60 |
| 4. Spouse of person in category 1 | 82.30 |
| 5. Spouse of person in category 2 or 3 | 71.80 |
| 6. Person under 21 years of age | 34.80 |
| 7. University student under 31 years | 58.80 |
| 8. Blind person | 46.80 |





KALIFORNIO INVADAS TIĤUANON: Jen du vidpunktoj de la Naŭa Kalifornia Konferenco. Maldekstre, Briĉjo Burg, kies tekste kaj muzike originalaj kantoj jam havigis al li la titolon "Esperanta Trubaduro", priparolas siajn varbmetodojn sidante surtable, dum Antonio Gallardo Méndez, Francis E. Helmuth kaj Charles R. L. Power rigardas. (Foto: John H. Fulton.) Dekstre, la konferencanaro aŭskultas. (Foto: Ellie Stein.) La Konferencon ĉeestis pluraj samideanoj el Meksikio mem.

# Revenas la perdita fil(i)o

Post longa erarvagado kaj diboĉado, nia amata filio Junularo Esperantista de Nord-Ameriko revenas al ni! Ni alportu la grasigitan bovidon kaj buĉu ĝin, kaj ni manĝu kaj estu gajaj; ĉar ĉi tiu nia filio estis mortinta, kaj denove vivas; ĝi estis perdita, kaj estas trovita. Kaj ni ne forgesu, ke ĝi postulas nutraĵon ankaŭ en formo de artikoloj, versaĵoj, klaĉoj ktp. por la reviviĝanta JEN-Bulteno. (Kaj monon ĝi ankaŭ bonvenigus; impostliberajn kontribuojn al la junulara kaso akceptas la kasistino de ELNA.)

JEN, la usona sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), inkluzivas ĉiujn ELNA-anojn malpli ol 30-jarajn. Por ke la organo de JEN havu aŭtentikan vivkialon, ĝi devos enhavi verkaĵojn de la JEN-anoj mem. (Jes, estas bone sciate, ke ĉiu esperantisto estas mense kaj kore juna, sed JEN estas por la junaj laŭ naskiĝdato.) Ili sendu siajn skribaĵojn al la provizora nova redaktoro, s-ro Mark Mandel, 1275 University Avenue, Berkeley, CA 94702.

# Ni kune kirlu la koktelon!

Usona koktelo estas la provizora titolo de la preparata literatura jarkajero de ELNA. Tiu koktelo ankoraŭ ne havas ĉiujn ingredi-encojn, do la redakcio invitas vin fari kontribuon! Ĉu en via tirkesto ŝimas novelo, poemo, eseo aŭ polemiko? La redakcio bonvenigos ĉiujn verkojn, ĉu originalajn, ĉu tradukajn.

Limdato por ĉiuj kontribuaĵoj estas la 15a de septembro. Ekverku! Sendu ĉion al la Centra Oficejo de ELNA.

# ELNA-Kongresa raportaro

Kiel ni promesis lastnumere, jen resumo de ĉiuj raportoj prezentitaj al la 21a Kongreso de ELNA en Ĉikago en decembro 1973.

La usona ĉefdelegito, s-ro Armin F. Doneis, raportis, ke meze de decembro 1973, UEA havis 517 individuajn membrojn en Usono, inkluzive 107 dumvivajn. 129 el ili ne estis samtempe membroj de ELNA. ELNA havis 697, inkluzive 48 dumvivajn. 301 el ili ne estis samtempe individuaj membroj de UEA, kvankam laŭkontrakte ĉiu ELNA-ano estas almenaŭ asocia membro de UEA. La kaso de ELNA pagis duonon ($176,33) de la kosto de membriga kampanjo, per kiu la ĉefdelegito dissendis ĉ. tri mil aliĝil-kompletojn. La inflacio ŝajne ne havis tiel grandan efikon, kiel oni timis, sed oni konstatis perdojn inter junuloj kaj emeritoj.

La raporto (73.12.27) de la kasisto de ELNA, s-ino Peggy Linker, montris suman saldon de $8 716,50, kiun konsistigis la ĝenerala ($4 615,33), vivmembra ($3 483,50) kaj junulara

($542,67) kasoj, kaj la memoriga kaso Rankin ($75,00). Elspezoj dum la jaro sumiĝis je $1 328,25.

La administrantoj de la Ekzamena Servo de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, ges-roj Roy Holland, raportis, ke el la 36 kandidatoj ĉe la Komencgrada Ekzameno, 29 sukcesis, 10 kun honoro; el la 15 ĉe la Mezgrada Ekzameno (la plej alta en Usono), 14 sukcesis, kvar (Paul C. Fox, Daniel Meilander, Jack K. Lesh, Harold R. Dreyer) kun honoro. Saldo fine de la administra jaro (72.07.01—73.06.19) estis $71,27.

La sekretario de la Komitato pri la Semajno de Internacia Amikeco, s-ro Ken Thomson, raportis proklamojn de kvar urbestroj kaj du ŝtatestroj (Ilinojso kaj Masaŝuseco). Ĵurnalaj artikoloj aperis en Cincinnati, Ohio, kaj Walla Walla, Vaŝingtonio. Mallongaj anoncetoj disaŭdiĝis per radio en Cincinnati. El pure mona vidpunkto estis malprofito de $42,40, sed restis granda stoko de ĉ. mil afiŝoj kaj pli ol kvar mil salutkartoj por estonta uzo.

La komisiito pri informiloj, s-ro Adrian Hughes, raportis ses mendojn dum la jaro (72.10.13—73.08.03). Neta profito estis $6,00.

Fine, de ges-roj William H. Schulze venis tri raportoj: de la vicprezidanto, s-ino Catherine L. Schulze, kaj de la Informcentro, aparte pri agado kaj financoj.

S-ino Schulze raportis, ke studentino Patricia Egan ricevis studunuojn pro asistado al instruisto de Esperanto, s-ino Doris Vallon, ĉe Abbott Middle School, San Mateo. Modelan agmanieron montris esperantistoj en Walla Walla, kiuj rikoltis specialan atenton de prof. d-ro Ivo Lapenna, prezidanto de UEA, kaj Columbus, pro laboro de s-ino Jane Wills kaj s-ro Lewis Cook. Multaj artikoloj aperis en plej diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj. La radiokurso de s-ino Jane Wills disaŭdiĝis en Walla Walla, Vaŝingtonio; Tampa, Florido; Oxford, Ohio; kaj Portland, Oregonio.

Ges-roj Schulze raportis pri la agado de la Informcentro (72.07.01—73.06.30). San-Franciska Ŝtata Universitato invitis magistron William Auld kvarafoje instrui someran kursaron en 1973. Abundis informpetoj, sume ĉ. mil, sed aparte menciindaj estis pli ol 150 de edukistoj kaj pli ol 50 de bibliotekistoj. Eksteraj rilatoj kun diversaj organizaĵoj estis kontentigaj. La Informcentro kunlaboris por helpi la vojaĝojn de polaj geaktoroj Zbigniew Dobrzynski kaj Kalina Pienkiewicz kaj de japana studento kaj spertulo pri la abako Minoru Tahira.

S-ro Schulze raportis, ke la sumaj elspezoj de la Informcentro estis $3 068,28, inkluzive de prokrastita parta pago por oficeja ekipaĵo ($750,00). El tiu sumo ELNA pagis $1 000,00.

## Nova redaktoro ĉe LMLP

Estas tre granda fiero por ELNA anonci, ke de nun unu el ĝiaj anoj redaktas la prestiĝan akademian revuon La Monda Lingvo-Problemo. Li estas prof. d-ro Richard E. Wood, 34-jara lingvisto kaj fakulo pri lingvokontakto kaj piĝinaj kaj kreolaj lingvoj, kiu ĵus iĝis asocia profesoro de lingvoj kaj estro de la fako pri lingvoj kaj internaciaj studoj ĉe Adelphi University, Garden City, Nov-Jorkio. Li transprenas la redaktorecon de d-ro Victor Sadler, direktoro de la Centra Oficejo de UEA.



La artikoloj aperas en diversaj nacilingvoj kun resumoj en Esperanto. Ili pritraktas lingvan diskriminacion kaj lingvajn barilojn el vidpunktoj de monda politiko, ekonomiko, juro, sociologio kaj ceteraj fakoj.

Prof. d-ro Wood iros al Germanujo ĉi-jare, kie li donos sociologian demandaron al la kongresanoj en Hamburg. Ĝi enketos pri la motivoj de la akcepto kaj lernado de la lingvo internacia.

Abono al La Monda Lingvo-Problemo, kiu aperas trifoje jare, kostas $12,00. Usona peranto estas s-ro Armin F. Doneis, P. O. Box 105, Pharr, TX 78577.

# PACIFIKA KONGRESO EN 1976

Jam de kelkaj jaroj japanaj kaj usonaj esperantistoj sopiras al la aranĝo de tutpacifika kongreso, sed neniu havis ĝis nun la kuraĝon organizi ĝin.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio firme decidis okazigi la Unuan Pacifikan Kongreson de Esperanto de la 4a ĝis la 10a de januaro 1976, en Melburno, Aŭstralio.

Kun plezuro la organizantoj povas anonci, ke ili sukcesis rezervi "Queen's College" de la Melburna Universitato. Ĉiuj kongresanoj loĝos, manĝos kaj kongresos en la bela kolegio, kiu situas en parksimila ĉirkaŭaĵo, tamen nur dek minutojn for de la urbocentro, kie aĉetavidaj gesamideanoj povos butikumi dum paŭzoj de la Kongreso.

Pro la reganta inflacio la Kolegio ne povis doni firman prezon, sed kredeble la fina prezo estos $11,00 ĝis $11,50 aŭstraliaj por bela ĉambro kun purigado, kaj kvin manĝoj en belega, preskaŭ luksa manĝosalono.

Por fruaj aliĝantoj la kongres-kotizo estos nur $7,00 aŭstraliaj. Ĉar nur ducent ĉambroj estos disponeblaj en la Kolegio, frua ĉambro-rezervo estas konsilinda. Depono por rezervi ĉambron estas $10,00 aŭstraliaj. Ĉiam aldonu internacian respondkuponon por respondo aŭ kvitanco.

Aliĝintoj de la Pacifika Kongreso rajtos partopreni ankaŭ la 20an Aŭstralian Esperanto-Kongreson sen aparta kotizpago, de la 2a ĝis la 4a de januaro 1976 (t. e. ĝuste antaŭ la Pacifika Kongreso) en la sama ejo. Kompreneble, oni devus mem aranĝi pri pli frua rezervo ĉe la Kolegio.

Dum la Kongreso okazos aroj da prelegoj, i. a. japana, nov-zelanda kaj amerika vesperoj. Oni serĉas kompetentajn prelegantojn por la usona parto de la Kongreso. Ĉiujn informojn, kotizojn kaj ĉambro-rezervojn pritraktas: The Secretary, Pacific Esperanto Congress, Box 2122 T., G. P. O. Melbourne, 3001, Aŭstralio.

# KOREKTO

S-ro John Futran petis korekton de senintenca misinformo aperinta en lia kandidata priskribo en la lasta numero. En 1925 li loĝis en Karlsruhe, Germanujo, kaj nur post la eksiĝo de EANA el UEA li fariĝis delegito en Nov-Jorko.



Nia okdekjarulo kun fratino Ellen Gregory. (Foto: Bath Evening Chronicle.)

# PIONIRO JUBILEAS

La 27an de aprilo ĉi-jare, nia alte ŝatata samideano Mark Starr, eksdirektoro de la orienta Esperanto-Informcentro, fariĝis 80-jaraĝa.


Ĉu tio signifas, ke li de nun retiros sin de la movado por la trankvila ripozo, kiun li meritas post vivo laborplena? Tute ne! La vivo nur komenciĝas! Kiel Victor Sadler, Direktoro de la Centra Oficejo de UEA, skribis nome de tiu asocio: "Deziri al vi pacan kaj ripozigan emeritecon jam ne havas sencon, ĉar evidente vi estas unu el la senlacaj batalantoj, kiuj neniam rezignas. Kaj tiajn ni ja bezonas! Estu al vi la jaroj malpezaj sur la ŝultroj, kaj restu sana kaj fortika por plue konstruadi, kiel ĝis nun."

S-ro Starr interesiĝis pri la internacia lingvo en Anglujo en 1917, instigite de sia fratino Ellen Gregory, kiu sub la pseŭdonimo "Nenjo Rimanto" verkis la libron Versoj por Infanoj. Li vizitis Sovetion en 1926, kiel ano de laborista delegitaro pri Esperanto. Li venis al Usono en 1928, i. a. pro scivolemo pri la granda salajro—po $5 tage!—kiun ricevis la laboristoj ĉe la aŭtofabriko Ford.

Jam spertulo pri la sindikata movado, li en 1931 fariĝis Kleriga Direktoro de la Internacia Sindikato de Vestaĵ-Prilaboristinoj. De tiu posteno li emeritiĝis en 1961, kaj tuj li profundiĝis en laboro por nia movado.

Nur lastatempe li reprezentis UEA kaj ELNA ĉe la Usona Asocio por UN; korektis plurajn kalumniojn pri nia lingvo ĉe tutlande disaŭdigita radioprogramo; instruis Esperanton ĉe Bryant Adult Center; verkis artikolon por preskaŭ ĉiu numero de Sennaciulo, organo de SAT, dum la lastaj monatoj; senĉese sendis leterojn al diversaj gazetoj pri la lingva problemo kaj ties solvo; nu, kiel fini la liston, se ne per "ktp."?

La sekreto de lia juneco kuŝas ne nur en la heredo (lia patro atingis 93 jarojn), sed en la korpekzerco, kiun li provizas al si per tiu senpolua veturilo, la biciklo. Jen ekzemplo por niaj veteranoj!




(El Kruko kaj Baniko el Bervalo)

# Jam pli ol kvin mil

Por la speciala kaso "Centra Oficejo" jam alvenis pli ol kvin mil dolaroj da kontribuoj. Koran dankon al ĉiuj kontribuintoj, inkluzive la dek ok anonimajn, kiuj kontribuis jen unu dolaron, jen pli ol kvincent. Specialan dankon al LKK Portland, kiu kontribuis la tutan profitporcion de la 57a UK, kiun ĝi ricevis. Ni ĉi tie publike kvitancas ĉiujn kontribuojn ricevitajn ĝis la 25a de majo.

Dankon ankaŭ al s-ro Frank Lanzone, longtempa amiko de Esperanto, pro la afabla prunto de ŝarĝaŭto por transporti oficejan ekipaĵon.

Ĉiuj kontribuoj al Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko estas impostliberaj. Sendu aŭ pere de la C. O., aŭ rekte al la kasistino de ELNA, s-ino Peggy Linker, 1414 Monroe Street, Walla Walla, WA 99362.

| | | |
|---|---|---|
| George J. Ackerman | $ | 12,00 |
| S-ino V. F. Allen | | 10,00 |
| Mel Applebaum | | 10,00 |
| Rev. D. Rex Bateman | | 15,00 |
| D-ro F. J. Belinfante | | 15,00 |
| Neil Blonstein | | 12,00 |
| Judith Bokelman | | 5,00 |
| Thomas Boyd | | 12,00 |
| James Brooke | | 5,00 |
| Nellie Jane Campbell | | 12,00 |
| Gerald H. Carlton | | 50,00 |
| Alberta Casey | | 15,00 |
| P. Chenoweth | | 5,00 |
| Ethel Clyde | | 600,00 |
| Ted Crawford | | 1,00 |
| Richard M. Dixon | | 12,00 |
| Sergio Docal | | 20,00 |
| Donald Munroe Esperanto-Klubo | | 15,00 |
| Mack X. Dougherty | | 10,00 |
| Arthur Eikenberry | | 12,00 |
| Ges-roj David Evans | | 10,00 |
| William J. Ford | | 12,00 |
| Ges-roj Cephas O. Fort | | 12,00 |
| Harold Foulds | | 10,00 |
| S-ino D. B. Fuller | | 12,00 |
| Ges-roj James Gibson | | 60,00 |
| S. Colum Gilfillan, Ph. D. | | 30,00 |
| Thomas H. Goodman | | 100,00 |
| Vincent A. Griffeth | | 15,00 |
| Rochelle F. Grossman | | 25,00 |
| Adrian Hughes | | 5,00 |
| Audrey Janisen | | 18,00 |
| James E. Jenkins | | 10,00 |
| Emma M. Jungton | | 50,00 |
| Robert Karlson | | 12,00 |
| David M. Keedy, M. D. | | 50,00 |
| L. U. Keppinger | | 12,00 |
| Ĝimo Kuŝino | | 12,00 |
| Stephen Lawrenz | | 2,90 |
| Ges-roj Hyman Ledeen | | 10,00 |
| Jack K. Lesh | | 25,00 |
| Ellen A. Lewis | | 2,00 |
| H. J. Lewis | | 10,00 |
| E. James Lieberman, M. D. | | 250,00 |
| Peggy Linker | | 60,00 |
| George Lockhart | | 60,00 |
| Loka Kongresa Komitato, Portland | | 1 031,26 |
| Eldred Woodrow Lowe | | 12,00 |
| Mark Mandel | | 5,00 |
| Cornelius J. McKown | | 15,00 |
| Mill Valley Esperanto-Rondo | | 6,00 |
| Winnifred F. Moore | | 5,00 |
| Takako Negi | | 6,00 |
| W. Campbell Nelson | | 25,00 |
| James H. Parks | | 12,00 |
| Stoddard Patterson | | 15,00 |
| Richard E. Plummer | | 15,00 |
| Charles R. L. Power | | 36,00 |
| Minerva Rees | | 20,00 |
| Julie Regal | | 8,00 |
| Lena Adams Schmidt | | 12,00 |

| | |
|---|---|
| Robert R. Schmitt | 15,00 |
| Edward Schultz | 15,00 |
| Ges-roj Quentin Schwenke | 10,00 |
| Robert J. Scott | 25,00 |
| Charles H. Scull | 25,00 |
| Mary Catherine Sears | 40,00 |
| William P. Simpson | 24,00 |
| Ges-roj Mark Starr | 500,00 |
| Ges-roj Louis Stein | 15,00 |
| Johano P. Stitz | 5,00 |
| F. H. Sumner | 15,00 |
| Robert A. Swenson | 5,00 |
| P. W. Trubey | 12,33 |
| Alice Tuch | 5,00 |
| H. Ken Ver Ploeg | 15,00 |
| John B. Victery | 10,00 |
| William V. Vitarelli | 5,00 |
| Ralph S. Walker | 10,00 |
| Constance Walsh | 25,00 |
| Elfrieda Walters | 5,00 |
| H. I. Weiner, M. D. | 25,00 |
| Nancy Wolter | 5,00 |
| Camille Wright | 10,00 |
| Kontribuoj anonimaj (sumo) | 1 565,00 |
| SUMO | $5 332,49 |



S-ino Jane Wills sidas meze ĉe la Kvina Ohia Esperanto-Kongreso.

## Ni funebras

Jane Wills, kreinto de la fama radia Esperanto-kurso unue disaŭdigita de WOSU, la stacio de Ohia Ŝtata Universitato, mortis la 18an de majo 1974, post atako de apopleksio. Ni kondolencas la edzon, la filon, la kvar genepojn, la fratinon kaj ĉiujn geamikojn, precipe la ohian Esperanto-movadon, kies lastatempan kongreson ŝi grandparte organizis.


Ĉina Esperanta monata gazeto

# EL POPOLA ĈINIO

Varbas abonantojn de 1974



**Abonprezo:**

*1 jaro* US $ 2.20
*2 jaroj* US $ 3.30
*3 jaroj* US $ 4.40

**Abonu ĉe:** Esperanto-Informcentro
P.O. Box 508
Burlingame, CA 94010

aŭ rekte ĉe Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Specimeno akirebla senpage


## SUK–kursteksto aperas

Ĵus aperis la unua kursoteksto rilate la duan sesion de Someraj Universitataj Kursoj (74.08.04-25). Temas pri la 88-paĝa verko Planktono kaj mara produktado de Prof. Enrique Balech, estro de la Hidrobiologia Stacio de Quequén, Argentino.

Aparte interesaj ĉapitroj certe estas la jenaj: fotosintezo de la fitoplanktono, vertikala distribuado de la planktono, la planktono kiel oceanografa indikatoro, pri la kapabloj de la maroj subteni la homaron ktp. Evidente, la aŭtoro donas specialan atenton al aspektoj elstare gravaj en nia tempo.

Tiu ĉi scienca teksto servos kiel studlibro por la partoprenantoj de la samtitola kurso, kiun la aŭtoro mem prezentos kadre de la biologia sekcio de SUK en la Universitato de Lieĝo. Kompreneble, la kajero ĵus publikigita estas plia riĉigo de la naturscienca literaturo verkita en la internacia lingvo.

(SUK-Estraro)

# Zigzage tra Esperantujo

La prestiĝa lernejo School for International Training de la orgazizo Experiment in International Living instruos Esperanton kaj ok aliajn lingvojn en Brattleboro, Vermonto, dum la somero. Interesitoj petu cirkuleron de la Centra Oficejo de ELNA.

Mel Applebaum aperigis sciigon pri sia intenco veni al la Auld-kursaro kaj al la ELNA-Kongreso en Spokane en la staba novaĵletero de Kolegio Foothill, Kalifornio.

En la ĵurnalo News-Journal de Delray Beach, Florido, aperis ampleksa artikolo "Esperanto Lauded As Second Language" pri 85-jara eksprezidanto de kaj la nov-jorka kaj la vaŝingtona Esperanto-societoj Lewis H. Maury.

Ankaŭ 69-jara ELNA-ano Stuart Kittredge respondecis pri granda artikolo, "Newington Man Speaks International Language", aperinta en la ĵurnalo de Newington, Konektikuto.

En la maja novaĵletero por la filio de Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libero en Berkeley, Kalifornio, f-ino Erna Harris atentigis pri la urĝa bezono por Esperanto, i. a. ĉe la Monda Asembleo okazonta en San-Francisko en 1975.

Prelegvojaĝon en Koloradio pri Bahaismo kaj Esperanto faris la nelacigebla s-ino Roan Orloff Stone. Laŭ la kvanto de informpetoj poste venintaj el tiu ŝtato, tre efike ŝi prelegis al ĉ. 250 personoj en dek ses apartaj grupoj. Ŝi ankaŭ intervjuiĝis kaj radie kaj ĵurnale.

Ĉe la printempa konferenco de la Pensilvania Ŝtata Asocio por Nuntempaj Lingvoj, William P. Simpson, eduka sekretario de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, ekspoziciis por AAIE kaj ELNA. Li disdonis i. a. mezurilojn kun naciaj kaj internaciaj unuoj, resp. coloj kaj centimetroj, kaj la vortoj "Esperanto estas la praktika solvo de la internacia lingvo-problemo".

En porinstruista gazeto The Common, aprilo 1974, Allan C. Boschen de Hoosac Valley High School en Adams, Masaŝuseco, komparis nian lingvon al la metra sistemo, kiu simile, malgraŭ sia evidenta utileco, devis barakti longan tempon antaŭ ol akceptiĝi.

La ege bedaŭrata s-ino Jane Wills (vidu nekrologon aliloke) faris ekspozicion ĉe la Fremdlingva Festivalo de Kolegio Otterbein en Ohio. Tie esperanta teatraĵeto venkis en la dramkonkurso.

Unu el la organizantoj de la venonta ELNA-Kongreso, H. Ken Ver Ploeg, atentigis pri la Kongreso kaj la lingva problemo, kiun ĝi strebos solvi, per letero en la ĵurnalo Spokesman-Revue, la 24an de aprilo.

Kiam ĉikaga esperantisto R. Kent Jones ne donas sian tempon al informado pri nia lingvo al edukaj instancoj, ĵurnaloj kaj radiostacioj, li agas kiel kunordiganto de tradukkomitato, kiu celas aranĝi interŝanĝon de artikoloj inter Medicina Internacia Revuo kaj Journal of the American Medical Association.

La filo, Michael Jones, sekvas la paŝojn de la patro kiel prezidanto de la Esperanto-Klubo de Tarrant County Junior College, Fort Worth, Teksaso.

Konstanta fluo da mendoj por lernolibroj venas de la Ŝtata Kolegio de Pensilvanio. Bibliotekisto Cornelius McKown tie utiligas sian postenon por fari konstantan ekspozicion. Artikolo pri McKown kaj Esperanto aperis en The Daily Collegian, la 9an de aprilo.

S-ino Bernice Garrett, William W. Glenny kaj komencantino Cathe Giles deĵoris ĉe ekspozicio en Anaheim, Kalifornio, kadre de la jarkunveno de California Foreign Language Teachers Association.

Al klaso de cerbe dotitaj infanoj ĉe Isojiro Oka School en Huntington Beach, Kalifornio, prelegis Leonard Rich, kies nepino estas ano de la klaso.

En grava poremerita gazeto Modern Maturity, aprilo-majo 1974, aperis letero de Charles F. Post pri la ega diverseco de korespondamikoj, kiujn oni povas havi pere de Esperanto.

Uzante A First Course de Auld, Calvin Cope donis enkondukan lecionon en Aptos, Kalifornio, la 10an de majo.

Artikolo pri Esperanto-kurso ĉe Pensacola Academy of Arts and Sciences (Florido) aperis en The Pensacola Journal, la 7an de februaro. Instruas s-ino Anne Schlimmel, estrino de la lingva fako.

Ĉe la Festivalo de l' Homaro en San-Francisko, la 2an de junio, Jay Berry, s-ino Catherine L. Schulze kaj Karl Pov propagandis por Esperanto. Pov legis la Grandan Alvokon en la internacia lingvo ĉe la solena fermo. S-ino Doroteo Holland faris ekspozicion kaj prezentadon ĉe samtema festivalo en Santa Barbara.

En la ĵurnala rubriko Teen talk de Ellen Peck kaj ELNA-Prezidanto E. James Lieberman, M. D., la 13an de majo, aperis demando kaj respondo pri nia lingvo. Tio rezultigis amason da informpetoj el Marilando.

## Anoncetoj

S-ino Ly Palu, kudristino, Leola 38-4, Viljandi Rajoon, Estonio, Sovetio, volas korespondi kaj/aŭ interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, literaturon, alumet-etikedojn, insignojn ktp.

S-ro Zoltan Beller, Budapest XIII, distrikto 1134, Angyalföldi-strato 38, Hungarujo, volas ricevi lumbildojn (ne necesas, ke ili estu en kadro).

Junulara grupo ĉe Janusz Sulżycki, str. Mazurska n-ro 9, 19 -520 Banie Mazurskie, Pollando, volas korespondi pri ĉiuj temoj.

Tuta familio volas korespondi ĉe s-ro André Pirson, Rue Colonel Piron, 93, B-4624 Romsée, Belgio.

Por kontakti esperantistajn gekorespondemulojn en Israelo, skribu angle al la vaste legata tel-aviva ĵurnalo Maariv, Karlebach Str., Tel Aviv, Israelo.

Biblia Revuo festas sian dekjaran datrevenon en 1974. Abonu ($6,00) aŭ petu specimenan numeron de la Direkcio de Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj, Piazza Duomo 4, 48100 Ravenna, Italio.

Por instigi eldonon de esperantlingva turisma prospekto, petu broŝurojn en la internacia lingvo de E. P. T., via Parigi n. 1, 00187 Roma, Italujo.

Turisma prospekto pri la urbo Liptov estas senpage havebla de Okresný národný výbor, odbor obchodu a cestovného ruchu, 031 41 Liptovský Mikuláš, Ĉeĥoslovakio.

Ĉiuj sonbendamikoj bv. sendi detalojn pri siaj magnetofonoj, ĉefinteresoj ktp. antaŭ la fino de julio al Sonbendamikoj, ĉe s-ro G. Stephenson, 2 Shagbrook Cottages, Buckland Road, Reigate, Surrey, Britio RH2 9RE. La informojn oni uzos ĉe preparo de nova listo, kiu estos ricevebla en aŭgusto kontraŭ respondkupono.

Por membriĝi en la unuiĝo "Internacia Esperanto-Muzeo en Wien" kaj ricevi ties bultenon, sendu $1,80 al la landa peranto de IEMW, s-ino Roan Orloff Stone, 504 N. 5th Street, Ballup, NM 87301.

Vastan informagadon pri Esperanto ĉe la Monda Asembleo en San-Francisko, somere 1975, planas la Mondcivitana Laborrondo, P. O. Box 2063, San Francisco, CA 94126. Laboremuloj proponu sian helpon!

## Ĉe la kluboj

Tro malfrue por inkluzivi la novaĵon en la artikolo pri kontribuoj al la fonduso "Centra Oficejo", nin atingis sciigo pri t. n. "remiza bazaro" de malnovaj objektoj okazigita de la Walla Walla Esperanto-Societo, kies tutan profiton, preskaŭ cent dolarojn, la Societo donacis al tiu fonduso. Tre imitinda agado!

La sama grupo sukcesis aperigi artikoleton pri recenzo de la scienc-fikcia romano Vojaĝo al Kazohinio ĉe societa kunveno en la loka ĵurnalo.

La aprila kunveno de la Esperanto-Klubo de Los Angeles estis adiaŭo al Laurin Lewis, kiu estis tuj ironta al Roterdamo por labori ĉe la Centra Oficejo de UEA.

La Esperanto-Societo de Iowa City raportis pri kunlaborado kun la C. O. de ELNA por provizi diversajn stabanojn de la Universitato de Iovao per informoj pri la internacia lingvo.

La san-franciska grupo SFERO ĝuis prelegon kun lumbildoj de ELNA-Arkivisto d-ro B. J. Balcar pri la sovaĝaj bestoj de Afriko en majo. La lumbildojn faris la filino de d-ro Balcar. Samkunvene Julie Dinnell prezentis grandan valizon plenan de poŝtmarkoj al Ĝorĝo Rodenborn, komisiito pri poŝtmarkoj por UEA.

La junia SFERO-kunveno inkluzivis teatraĵeton, tripersonan poemdeklamon kaj interŝangon de respondoj al antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto, kiun kondukis Mark Mandel.

La Hoosac Valley Esperanto-Klubo (Masaŝuseco) ĵus eldonis tutan laborplanon por la kluba jaro 1974-5. Ĝi inkluzivas viziton al UN en oktobro, la 2an Novanglujan Regionan Esperanto-Kongreson en novembro kaj Zamenhof-Kristnaskfeston en decembro.

Kiel kutime, la Esperanto-Societo de Portland okazigas tutan aron da kursoj, kiujn instruas Nellie Jane Campbell, James Deer, Evelyn Deer, Anne Whitteker kaj Hazel Heusser.

### KONTRAŬ RASISMO EN AMASKOMUNIKILOJ

Spertuloj pri la amasinformiloj kunvenis de la 11a ĝis la 15a de marto en la Domo de Unesko por redakti rekomendojn por deklaro kontraŭ la uzo de amaskomunikiloj por disvastigi militpropagandon, apartismon kaj rasismon.

La spertuloj, juristoj, anoncistoj de radio kaj oficistoj de ministerioj pri informado, el dek du landoj, sendos siajn rekomendojn al la Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ro René Maheu, kiu en oktobro devos prezenti malneton de deklaro al la Ĝenerala Konferenco de Unesko dum kunveno en Parizo.

(Unesko-Novaĵoj, UEA)

Abonojn al ĉiuj esperantaj periodaĵoj de la mondo peras Esperanta Lingva Serva Kompanio, 3318 N. Lake Shore Drive, #801, Chicago, IL 60657. Sendu afrankitan koverton por prezlisto de 78 gazetoj el 26 landoj.

## USONO—LANDO DE MUZEOJ

El 15 725 muzeoj en la mondo, 2 889 troviĝas en Usono, kiu estas tial la lando kun la plej alta nombro da muzeoj. En la dua loko staras Sovetio kun 1 173. Sekvas Japanujo (1 108), Britujo (900), Francujo (805), Kanado (708), Italujo (581), Germana Demokratia Respubliko (552), Hispanujo (534) kaj Germana Federacia Respubliko (507). La ciferoj estas laŭ la Statistika Jarlibro de Unesko, ĵus eldonita.

(Unesko-Novaĵoj, UEA)


Ĉiujn mendojn sendu al: ELNA Book Service
P. O. Box 508
Burlingame, CA 94010

(Bv. aldoni $0,50 por poŝtkostoj al ĉiu mendo malpli ol dek-dolara.)




**La Lanternisto**

kaj aliaj prozaĵoj de H. Sienckiewicz kaj aliaj polaj verkistoj elektitaj de K. Bein (Kabe), nia fama E-stilisto, kiu tradukis ĉiujn 23 rakontojn elegante kaj imitinde. Ĉiu rakonto donas al sia leganto specialan ĝuon pro enhavo kaj lingvaĵo. 207 pĝ.

$4,75




**KIT VIVAS**

romano de Jytte Lyngbirk, tradukita el la dana lingvo de Gudrun Riisberg, 96 p. La 17-jara Kit venis en rondon de narkotistoj. Ŝi ne sukceas liberiĝi el ĝi. Fine ŝi tiom malesperas, ke ŝi decidas dronigi sin. Ken ŝin savas – kaj la du gejunuloj amikiĝas. Li jam preparis vojaĝon al Usono – kaj konsilas, ke ŝi partoprenu. Tamen . . . ŝi estas tro dependa de narkotaĵoj . . . Bela kaj komprenema romano, kiu tenas la scivolemon de paĝo al paĝo.


$4,25




**PRINTEMPO EN LA AŬTUNO**

romano de Julio Baghy, nia plej fama verkisto. Li diras pri ĉi tiu romano, ke ĝi estas »historieto de dolĉa melankolia renkontiĝo de juna knabino kaj gimnaziano«. Pri ilia burĝona amo li rakontas. En sia enkonduko li petas »Ame akceptu ĝin, ĉar ame ĝi estas dediĉata al vi«. 116 pĝ.

$2,50




**Patroj kaj Filoj**

konata romano de la rusa verkisto I. Turgenjev, kiu pritraktas la konflikton inter la du generacioj »patroj« kaj »filoj« kaj priskribas vivon kaj cirkonstancojn en bienulaj kaj laboristaj medioj en tiama Ruslando. Ĝin tradukis K. Bein (Kabe), kiu fariĝis nia unua eminenta stilisto. 3-a eldono. 215 pĝ.

$4,75




**DISKO**

Ciklo da skizoj, originala verko de J. H. Rosbach, norvego; enkonduko de William Auld. »Disko« estas la nomo de ŝipo, kiu antaŭ jaroj regule trafikis inter Danlando kaj Gronlando. La rakontoj de Rosbach iel ligiĝas al tiu ŝipo kaj ĝia sorto. Per ĉi tiu libro li atingis la plej altan ŝtupon de sia evoluo kiel novelisto. Kara legonto, ankaŭ vi entuziasmiĝos. 108 paĝoj.

$2,50

Vendimposto aldonenda por kalifornianoj.